Rusio rifuzas minacojn de Trump pri militaj kunlaboroj de tiu lando kun Venezuelo.

Moskvo, 28 mar (RHK) La rusa registaro indikis ke Usono devus eliri el tiuj landoj kie ili havas trupojn, anstata? sugesti al la aliaj forlasi iun lokon, aludante tiel al la minacoj de Trump pri militaj rilatoj inter Moksvo kaj Karakaso.

Maria Zajárova, kiel parolanto nome de la ministerio pri eksteraj rilatoj de Rusio, esprimis ke “ Usono devus starigi sian propran koncepton de eliro, specife pri Sirio (…) jam pasis monato kaj mi ?atus klarigi, ?u ili eliris a? ne?, ?i pridubigis.

Tiu ?i deklaro esti?as kadre de la elparolo de la usona prezidento Donald Trump, kiu esprimis en la Blanka Domo ke “Rusio devas eliri” el Venezuelo kaj konfirmis ke “?iuj opcioj estas malfermaj”.

Trump referencis al du militaj aviadiloj rusaj, kiuj alvenis al Venezuelo pasintan sabaton kun faka personaro, la? la interkonsento kunlabora tekniko-milita ekzistanta inter amba? landoj, subskribita en la jaro 2001.

“Anta? ol enmiksi?i en la legitimaj interesoj de aliaj ?tato, ni konsilus al la administracio usona, ke ili konkretigu libere la promesojn faritajn al la internacia komunumo”, ?i emfazis.

Zajárova insistis pri tio ke la landoj, kiuj impulsas pu?on kontra? la registaro de Nicolás Maduro estas la samaj kiuj, subpremitaj de Va?ingtono “glaciigis, ni diru diplomatie, 30 mil milionojn da dolaroj de Venezuelo, sed ?enerale dirite, ili ?telis tiun monon.”

La ministro pri eksteraj rilatoj de Venezuelo Jorge Arreaza, taksis cinika kaj hipokrita la enmiksi?on de Usono en la internaj aferoj de Venezuelo kiam intervenas en la programo de reciproka kunlaboro ekzistanta inter Venezuelo kaj Rusio.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/186990-rusio-rifuzas-minacojn-de-trump-pri-militaj-kunlaboroj-de-tiu-lando-kun-venezuelo

Radio Habana Cuba